# FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

STIFTUNG BSW

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | Numero 3 | Julio/Septembro 2010


## 175 Jahre Eisenbahn in Deutschland




Jubiläumstour mit ICE-Werbeträger am 13.8. vor dem Hauptbahnhof in Bremen
Foto: Ehrlich

## Meine Nachbarn „Hermann und Charlotte“

Es war an einem Apriltag, Die Sonne schien, es war warm, die Vögel zwitscherten. Ich saß auf meinem Balkon und freute mich über den herrlichen Tag. Da kam mein 10-jähriger Enkel Simon. Seine Eltern kamen vor 9 Jahren bei einem Autounfall ums Leben. Seitdem lebt er bei mir. In meiner Nachbarschaft wohnt eine 80-jährige alleinstehende Dame mit der sich Simon angefreundet hat und die er oft besucht. Er holt ihr die Post, entsorgt ihren Müll und kauft manchmal für sie ein. Die beiden mögen sich und das ist mir recht. Heute kamen mir Bedenken! „Oma, sieh mal, die beiden Alten da unten, sind die nicht albern?“ Ich sah Simon verblüfft an. „Wie meinst du das?“ Hermann streichelt die Frau und die fummelt an seiner Krawatte herum! „Na und? Die sind eben nett zueiander.“ „Ja, aber die sind nicht verheiratet!“ (Aha, Frau Bauer) „Frau Bauer sagt, was Hermann und Charlotte tun, ist albern und gehört sich nicht.“ „Die beiden können tun, was sie wollen. Sie sind niemandem Rechenschaft schuldig. Ich freue mich, wenn sich zwei ältere Menschen noch umeinander kümmern. Wenn Deine Eltern noch hier wären, würden sie sich ja auch um Dich und mich kümmern und nett zu uns sein.“ „Oma, ds ist doch ganz etwas anderes.“ „Nein, das ist nichts Anderes. Jeder Mensch braucht Liebe und Zuneigung.“

Simon kam in meine Arme und fühlte sich offensichtlich wohl. Ich frage mich, erziehen wir unsere Kinder richtig? Sind sie so gefühllos, dass es uns gleichgültig ist, wie es dem Nachbarn geht! Das kann und darf nicht wahr sein.

*Elfriede Kruse*

**Schon angemeldet zur Jahresversammlung vom 15 bis 17.10. in Clausthal-Zellerfeld ?**

## Skribi per sepioinko

Kiam alprosimiĝas malamiko, la sepio sprucas porcion da inko. Kiam foriĝas la inknebulo, la sepio ne plu estas trovebla.

Sed tiu sepioinko ne nur estas utila por la animalo. Ankaŭ la homaro lernis sufiĉe frue uzi tiun fluaĵon por siaj celoj.

Jam 1780 oni skribis per la sepioinko, tiam servis la plumtubo kiel skribilo.

Oni uzis por la inkproduktado la inksakon de la sepio. La inksakojn oni sekigas kaj pulvorigas ilin poste. La pulvorigita amaso estas miksita kun akvo kaj araba gumo.

La akirita inko ne estas tute nigra, sed malhelbruna. Kvankam la hodiaŭa inko estas multe pli facile kemike produktata ol la sepia inko, ekzistas do kelkaj kaŭzoj, uzi la sepian inkon. Artistoj ŝatas labori per sepia tuĉo.

Sed, estas ankaŭ ombro sur la plezuro: La sepia inko flavas longtempe kaj penetreme je fiŝo.

Trovita en vikipedio: Dieter Hartig



# LORELEJO

## memore al nia jarkunvena ekskurso 2009

Ne scias mi, kial subita
malgaj' en la koro naskiĝis;
el tempo jam enterigita
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,
la Rejno mallaŭte babilas,
per oro de l' sun' en vespero
la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:
en ora ornamo brilante,
sur supro de l' monto ŝi sidas,
la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas
kaj kantas tra l' pura aero,
kaj forto mirinda sin trovas
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

Ŝipet' iras sur la rivero,
ŝipisto ektremis de l' kanto,
kaj blinda por ĉiu danĝero
rigardas li al la kantanto.

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela
perdiĝis sub l' akvoturnado;
ĝin Lorelej' faris kruela,
per sia mirinda kantado.

Ludoviko Lazaro Zamenhof
(1859-1917)

Malgajon mi sentas en koro,
sed kial tia tim'?
Legendo el pratempa foro
Vagadas tra mia anim'.

Jam fluas la Rejn' en malhelo,
kaj malvarmetas l' aer'.
Sed brilas la mont' en orbelo
pro suna lum' de l' vesper'.

Jen supre knabino provokas
per ora juvelar',
kaj ŝia beleco allogas
kaj ŝia ora harar'.

Ŝi kombas ĝin, kantas sorĉige,
sirene kantas ŝi
per neimagebla, mirige
potenca melodi'.

Ŝipiston en eta boato
Turmentas koremoci'.
Ne ĝenas lin rifo-kaskado,
rigardas nur supren al ŝi!

Ĝis tiras kun si al Rajn-fundo
la ondoj lin kun boat'.
Nun kuŝas li en la profundo
pro Lorelaja kantad'.

Joachim Gießner
(1913-2003)

# Abrakadabra




Estas magia formulo kontraŭ malsano, malfeliĉo kaj obskuraj fortoj.
La vorto Abrakadabra ekzistas en multaj lingvoj, eĉ en la sama prononco. Ĝia deveno estas eble el la araba aŭ la hebrea lingvoj. Ĝi estas menciita jam en *Liber medicinalis* de Quintus Serenus Sam-monikus (en la jaro 200 de nia erao).
La signifo estas ankoraŭ ne solvita:

Povas esti fuŝitaj hebreaj vortoj "beno" (bracha) aŭ "sankta vorto" (dabar).

Similas ankaŭ al Abraxas. (vorto pri scienco de diaj ekkonoj.)

Devenas eble de la hebrea "ha-Bracha dab´ra" (Sprich die Segnung).

Abrakadabra povas deveni de la araba magio „breq ad habra" kio signifas: "mortigu la tondron".

Klarigo ŝajne estas la aramea vorto "Avra KaDabra", kio signifas "mi kreadiĝas dum mi parolas".

Supozeble estas la hispana/latina nocio "abra (el) cadaver" (malfermu la animalkadavron).

En la simboliko pri scienco de dia ekkono (Gnostizismus) estis Abra-kadabra uzita por eviti minacantan malbonon, precipe por forpeli malsanojn. Tio okazas per laŭpaŝe malkreskigita grafikaĵo. Oni ĉiutage forstreku unu literon el la mirakla formulo Abrakadabra. Per ĉiu for-strikita litero pliboniĝas la malsano iom ĝis la lasta litero donas kompletan resaniĝon.
La iluziistoj kaj prestidigitistoj uzas la nenie signifikatan vorton Abrakadabra por imponi sian publikon.

„Abrakadabra" diras nun Dieter Hartig

Fonto: „vikipedio, la libera enciklopodio"




Foto: vikipedio

# Nur 20 € monbileto

estis je mia dispono por noti telefonnumeron kaj nomon. Ĉu tio senvalorigis la monbileton? Ĉu mi rajtas skribi sur monbileton?

Jes, mi rajtas!

La Centrala Banko ja eldonas la monbiletojn, do ne restas proprietulo de la freŝpresitaj eurobiletoj. Ankaŭ al la ŝtato ili ne apartenas.

La monbileto en via monujo apartenas al vi, laŭ nia civila kodo. Vi povas fari per ĝi, kion vi ŝatas. Eĉ forbruli ĝin vi rajtas, sed mi ne rekomendas tion.

Se tamen ekzistas tre grava limigo: Kiu malantaŭ la 20 skribas plian nulon, eĉ se tio nulo estas fuŝe farita, riskas la riproĉon de falsado kaj tio estas krimo.

En diversaj landoj estas la traktado per monbiletoj menciinde diversaj.

En Italio estas la surŝmiraĉo de monbiletoj permesita, kondiĉe oni ne faras tion per obscenaĵoj.

Kontraŭe en Turkio estas la monbiletoj ŝtata propraĵo kaj la skribaĉado severe malpermesita.

En USONO estas la difektado de monbiletoj kontraŭorda. Oni severe difinas, kiam tio stato okazis

Per "unfit for cirkulation" oni en USONO markigas eluzitajn monbiletojn.

Notitaj telefonnumeroj faras la dolarbiletojn ankoraŭ ne "unfit".

Fonto: Gaja interparolado de Dieter Hartig kun bankkasisto.

# El fervoja mondo

Aŭstrio

## Esplortunelo en Brenner finborita

Borajoj por esplortunelo de la baza tunelo *Brenner* en la sudtirola *Mauls* estis finitaj. La tunelo longas 1767 metrojn kaj ĝia celo estas difini al la fakuloj, kia estas konsisto de la rokajoj. La borajoj daŭris pli ol 18 monatoj kaj bedaŭrinde estis akompanataj per kelkaj akcidentoj. La pli malfacila parto de la konstruado tamen nun okazos. Oni jam komencis borajojn por aliaj du esplortuneloj, apud *Aich* kaj *Insbruck*

Germanio

## Trovitajon oni uzos por *Kinderlounge*

Germanaj fervojstaciaj misioj profitas el senzacia trovitajo en unu el la grandrapidaj trajnoj ICE. En oktobro 2006 unu pasaĝero en trajna tualetejo ICE inter *Hanau* kaj *Frankfurt/Main* trovis 400 mil eŭrojn kaj transdonis la sumon al la polico. La trovita mono restis deponita en Servejo de perdoj kaj trovajoj DB. Ĉar dum tri jaroj, kiel diifinas la leĝo, neniu aliĝis por rericevi la monon, la financaj rimedoj restis dispone al DB. La trafikisto transdonis al la honesta trovinto krom trovrekompenco ankaŭ la sumon 25 mil eŭrojn, kiun la koncerna viro dediĉis por socialaj projektoj. Per restantaj proksimume 370 mil eŭroj DB subtenos la fervojstaciajn misiojn. La mono estas destinita por la projekto *Kinderlounge,* kiam en tri fervojstacioj estos instalitaj spacoj kun ludiloj por infanoj kaj eblo revindi (suĉ)infanetojn.

Kompilis Jindřich Tomíšek

Germanio

## Fervojo investas en la *Duisburg*-haveno

Pro la antaŭvidebla fino de la germana ŝtonkarbo, la bezono de importenda karbo altiĝos ĝis 2018 rondsume je 11 milionoj da tunoj jare. Tial la Germana Fervojo Akcio-Societo (*Deutsche Bahn AG)* investos ĝis en la jaro 2014 rondsume 19 milionojn eŭrojn por plivastigi kaj modernigi la transkarg- kaj depon-kapaciton sur la karboinsulo (*Kohleninsel)* en la *Duisburg*-haveno. Tion antaŭvidas aktuala estrardecido de *„DB Mobility Logistics AG"* (germana societo *DB/Schenker*), kiel publikigis la entrepreno en Berlino. Tiu, por transkargado de import-ŝutajo strategie favore situanta insulo, disponas nuntempe kapaciton de 2,5 milionoj da tunoj jare. Ĝis la fino de la jaro 2014 oni intencas plimultigi la kapaciton al 4,5 milionoj da tunoj. Ĝis tiam duobliĝos la kapacito de importo per riverŝipoj el *Rotterdam.* Samtempe ankaŭ duobliĝos la transkargado, stokado kaj la livero de karbo al elektraj centraloj.

Trovita 30.07.2010 en WAZ de Rolf Terjung
Fotoj el vikipedio





# GEFA – Nützliche Adressen

## Hauptbeauftragter

für Esperanto in der „Stiftung Bahn-Sozialwerk" und Präsident von GEFA
Achim Meinel, Bachstelzenstr. 5,
14612 Falkensee, Tel. 03322-425888
E-Mail: achimeinel@gmx.net

## GEFA-Finanzen

Helga Vogelsang, Riesenbergsiedlung 48.
99755 Ellrich, Tel. 036332-21395

## Bezirksbeauftragte

**Region Nord**
Karl-Heinz Marzahn, Sollingstr. 39,
28307 Bremen, Tel./Fax 0421-481339,
mobil 0157-79647715
E-Mail: k.h.g.marzahn@nord-com.net

**Region West**
Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16,
59302 Oelde, Tel. 02522-3652
E-Mail: manfred.retzlaff@gmx.net

**Region Süd**
Siegfried Krüger, Claudiusweg 10,
74074 Heilbronn, Tel./Fax 07131-162688
E-Mail: siegfriedkrueger@arcor.de

**Region Ost**
Claudia Würker, Klein Grönland 9,
08468 Reichenbach, Tel. 03765-16846



## Beauftragte für Sonderaufgaben

**Kassierer GEFA**
Karl Bernhard, Sauerbruchstr. 8,
67063 Ludwigshafen,
Tel. 0621-510782, Fax 03222-1481561
E-Mail: karlbernhard@hotmail.de

**Zeitschriftenversand u. Seniorentreffen**
Rolf Terjung, Finkenschlag 68,
47279 Duisburg, Tel./Fax 0203-724095
mobil 0175-2082909
E-Mail: elro.terjung@t-online.de

**Redakteur "Fervoja Esperantisto"**
Fritz Lautenbach,
Abtstor 21, 36037 Fulda,
Tel. 0661-77627, Fax 0661-3029692
E-Mail: fritzlautenbach@gmx.de

**Protokollführer u. IFEF-Komiteemitgl.**
Walter Ullmann, Im Mühlfeld 69a,
61169 Friedberg, Tel./Fax 06031-4617

**Leitung Fachwörterausschuss GEFA →IFEF→UIC**
Dr. Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2,
01445 Radebeul, Tel. 0351-8385877
E-Mail: Hoffmann-IFEF@cablemail.de

**Mitarbeiter Fachwörterausschuss und Verbindung zu DB AG**
Bodo Ehrlich, Knaustwiesen 36,
34130 Kassel, Tel. 0561-4748764
mobil 0160-97473403
E-Mail: behrlich.esperanto@online.de

Ni kore gratulas al



**Heinz Schindler**

kiu festis sian 90-an naskiĝtagon la 19-an de aŭgusto 2010.
Li eklernis la lingvon jam en 1946. Ek de 1959 li estas tre aktiva membro de GEFA. Li estas dumviva membro de UEA kaj honora membro de IFEF. Per Esperanto li entreprenis multajn vojaĝojn al pli ol cent diversaj landoj kaj kontaktis kun multaj eksterlandaj Esperantistoj. Preskaŭ ĉiujn IFEF-kongresojn kaj GEFA-jarkunvenojn li vizitis.

Nur kelkajn tagon post la forpaso de Heinz Papenfuß
mortis sia edzino 83 jaraĝa

**Erna Papenfuß.**

Ni ĉiam vidis ilin kune sur niaj kongresoj kaj kunvenoj.
Ambaŭ ili restu en nia memoro.
Ripozu en Paco, kara Erna. Hg



## KALENDARO

10.-12.09.2010
Eŭropa lingvopolitika semajnfino
St. Andreasberg/Harz
http://www.sonnenberg-international.de/

08.-10.10.2010
6a Mosellanda Esperanto-Semajnfino
sur Marienburg apud Zell/Mosel
wolfgang.bohr@esperanto.de
Tel. (02641) 4885

Wenn Sie uns eine Spende zukommen lassen wollen, hier unser Konto:
Deutsche Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
Konto 953 729 bei der Sparda-Bank Hessen, BLZ 500 905 00

Redaktfino por FE 4/2010 estos la 15.11.2010
Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt am Main
Schriftleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel. (06 61) 7 76 27, Fax (06 61) 3 02 96 92, E-Mail: fritzlautenbach@gmx.de